

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 40 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1980 - 5

KULTURAJ KAJEROJ

1980 SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Fiŝoj, fiŝkaptantoj kaj frandemuloj en Anĵu B. Cheverry

Ĉu linĉado estas fonto de la homa kulturo ? F. Boyet

Antaŭ kvindeko da jaroj, la unuaj aŭtomobilaj rekordoj en Montlhery S. Guillot

Pri etnismo, lingvo « Oc » kaj Esperanto Valo

Honoré Bourdelon

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

LA KULTURA VIVO EN LA ESPERANTO-DOMO

Dum la komencaj jaroj, la ĉefa studperiodo organizita en Gresillon estis, kompreneble, la Somerlernejo ĉar por ties organizado la kastelo estis aĉetita. Tiun tradician periodon organizis la Grupo de Esperantistaj Edukistoj ĝis 1957. Je tiu dato S-ro Micard kaj tri el liaj amikoj estis devigataj elekti inter la gvidado de la Esperanto-Domo kaj la aparteno al la konsilantaro de GEE. Ili elektis la Esperanto-Domon. De tiu tempo estis organizitaj la « Esperantistaj Kulturaj Semajnoj ». La etoso estis familia sed tamen oni multe laboris. Al la tri esperanto-kursoj oni aldonis la bindadon de libroj en 1954 kaj korbofaradon en 1957. La datoj plurfoje ŝanĝiĝis sed ne multe la formo de tiu periodo dediĉita al kursoj.

Tute aliaj aspektas la komence nomitaj « Internaciaj Restadoj » kiuj fariĝis periodo sen titolo dediĉita al prelegoj. Dum tiu altnivela periodo gesamideanoj el la tuta mondo povas ricevi informojn kaj diskuti pri la plej diversaj temoj. Prelegis unu aŭ plurfoje eminentaj esperantistoj el kiuj ni citu kelkajn : I. Lapenna, W. Auld, G. Waringhien, M. de Waard, A. Albault, J. Thierry, P. Neergaard, E. Lapenna. D. Dalmaŭ, V. Setälä, W. Borman, M. Duc Goninaz, H. Rollinger, R. Schulz kaj aliaj pli malpli konataj de la granda publiko esperantista, sed kiuj talente helpis en la intelekta pliriĉiĝo de ĉeestantaroj. Aparte menciinda estas S-ino Cheverry kiu jam de dekkvin jaroj prezentis la multajn aspektojn kaj facetojn de sia amata kaj bone konata regiono Anĵu al centoj da diverslandaj ĉeestantoj.

Ne ĉiuj periodoj sukcesis. Laŭlonge de la jaroj kelkaj malaperis. En 1956 estis organizita kurso de franca lingvo por eksterlandanoj pere de Esperanto. Ĝi daŭris ĝis 1960 sed ne povis kunigi grandan ĉeestantaron. Dum kelkaj jaroj la Unuiĝo Franca por Esperanto organizis kursojn frue en Julio kaj malfrue en Septembro. La studado estis tre serioza sed la ĉeestantaro ne multnombra.

La estraro iam pensis, ke estus necese malfermi la kastelon dum vintraj kaj paskaj ferioj. Dumvintre okazis nur unu studperiodo, en 1962. Pro la malfavora vetero ĝi ne sukcesis. Dum la sekvantaj vintroj okazis kunvenoj de amikoj kiuj venis por ordigi kaj labori pri la plibonigo de la domo. Kelkaj filmoj estis esperantigitaj, laboro kiu postulis tre grandan nombron da laborhoroj ĉar la teknikaj obstakloj montriĝis multnombraj. Tiuj vintraj restadoj estis la okazo de gajaj renkontiĝoj. La Paskaj Ferioj estis malsamaj. De 1956 ĝis 1961 okazis kursoj pri Esperanto kaj librobindado. En 1962 UFE organizis la unuan « Kultura Semajno ». La sukceso estis tre granda. Multaj estontaj instruistoj ĉeestis kaj donis al tiu periodo specialan etoson, junan, vivoplenan, kelkafoje bruan. Tiu Kultura Semajno malaperis, kiam S-ro Llech Walter ne plu povis okupiĝi pri ĝia organizado. Nun, jam de pluraj jaroj, kun grandiĝanta sukceso okazas dum la printempaj ferioj Internacia Renkontiĝo de Infanoj prizorgita de S-ro F. Le Magadure, prezidanto de GEE.

De 1952 ĝis 1980 pli kaj pli nombraj estis la vizitantoj ĉefe la eksterlandaj. Ĉiujare venas gesamideanoj ankoraŭ nekonataj sed ankaŭ multaj estas la amikoj, kiuj jam plurfoje ĉeestis studperiodojn en Gresillon. Jam sidis en la salonoj aŭ la kursĉambroj, jam ripozis sur la herbejoj de la Esperanto-Domo miloj da homoj el ĉiuj kontinentoj ; miloj da geesperantistoj venis esperplenaj aŭ timemaj kaj foriris kun kapo plena de agrablaj memoroj, kun okuloj plenaj de larmoj. Homoj konatiĝis kun homoj, amikoj adiaŭis amikojn. En Gresillon ĉiujare pligrandiĝas la homa rondo ĉirkaŭ la mondo, dank'al homo, kiu estis sufiĉe optimisma, sindonema kaj kapabla por sukcese konkretigi idealon.

Esperanto tra la Mondo

La Universala kongreso en Stokholmo :

La 65a Universala kongreso de Esperanto malfermiĝis la 3an de Aŭgusto en la Popola Domo de Stokholmo, kun la ĉeesto de pli ol 1800 kongresanoj venintaj el 51 landoj. S-ro Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento, alparolis la kongreson en Esperanto (kiun li studis en 1930). Estis registaraj reprezentantoj el 22 landoj.

Kiel antaŭvidite, estis elektita nova prezidanto de U.E.A., S-ro Gregorie Maertens, kiu okupas gvidan postenon en la belga esperanto-movado. Li fariĝis estrarano de U.E.A. antaŭ tri jaroj. Profesie, li estas ministeria konsilanto kaj docento pri impostoj en la financa altlernejo en Bruselo. Nova asocia membro estis akcepita : Ĉina Esperanto Ligo.

Unu el la du ĝeneralaj kunsidoj estis dediĉita al la temo « diskriminacio ».

Oni scias ke la kongreso 1981 okazos en Brazilio.

La junulara kongreso :

332 gejunuloj el 30 landoj certigis la sukceson de la 36a Internacia Junulara Kongreso en Ruma (Finnlando). La televido multe filmis dum la tuta kongreso. Seminariaj kunsidoj « Esperanto en la 80aj jaroj » preparis interesajn konkludojn por la informlaboro.

En 1981, la Junulara Kongreso okazos en Oaxtepec, en Meksikio (10-17a de Julio).

Kongreso de S.A.T. en Rijeka (Jugoslavio) :

En tiu jugoslavia havenurbo, de la 19a ĝis la 25a de Julio, 380 gekongresanoj el 18 landoj kunvenis por la 53a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Krom la laborkunvenoj, la ekskursoj, okazis ekspozicio « Laborista movado kaj Esperanto » kaj prelego de Lina Gabrielli pri Tolstoj.

La fina gvidrezolucio substrekas interalie ke « la lingva diskriminacio tenas la laboristaron en kvazaŭ analfabeta stato ».

Fondo de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto Movado :

Dum la 6a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto Movado okazinta en Strasburgo de la 26a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto, estis fondita Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto Movado kaj akceptita ĝia statuto. Por informoj, skribi al H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK 2800 Lyngby (Danlando).

Amerika kontinenta kongreso :

La unua Tut-Amerika Esperanto kongreso kunigis 350 partoprenantojn el 7 landoj, en San Luis (Argentino), por laborkunvenoj, sciencaj kaj teknikaj prelegoj, artaj festivaloj.

Multvizitita renkonto en Pollando :

De la 28a de Majo ĝis la 1a de Junio, estis aranĝita nun tradicia internacia esperanto renkonto en Byogoszcz (Pollando), kun partopreno de 9000 poloj kaj 330 gastoj el 11 landoj.

Novaĵoj el Ĉinio :

Ĉiu monate, la interesa revuo « El Popola Ĉinio » alportas novaĵojn pri la starigo de regionaj aŭ lokaj esperanto-asocioj, pri ekspozicioj, ktp... Krome, estis lasttempe eldonitaj en Esperanto « El Ĉina poezio », kolekto de cent poemoj de antikvaj kaj modernaj poetoj, tradukitaj de eminenta ĉina esperantisto Prof. S.J. Zee.

Esperanta seminario pagita de Eŭropa Konsilio :

Inter la 15a la 21a de Junio, T.E.J.O., la organizaĵo de la junaj esperantistoj organizis en Strasburgo seminarion por 34 movadaj aktivuloj.

La temo estis : « Internacia komunikado — aplikado de Esperanto ». Por tiu seminario, Eŭropa Konsilio disponigis al la organizantoj la modernan kaj bone ekipitan eŭropan junularan centron. La centro disponigis al la partoprenantoj senpagan loĝadon, manĝojn kaj repagon de vojaĝelspezoj, vidbendan aparaton kaj sekretariajn aparatojn.

Agado en Pakistano :

Agado por Esperanto estas perceptebla en pluraj lokoj de Pakistano depost la apero, en 1976, de Urdua Esperanta Lernolibro. Ekzistas Pakistana Esperanto Asocio kiu jam dufoje kongresis.

Urdua versio de la « Ekzercaro » jam aperis kaj oni baldaŭ eldonos esperantan kaj urduan vortaron. La televido raportis pri Esperanto kaj la asocio havas informan centron. La centra biblioteko en Murree havas 200 esperantajn librojn.

En Zairio :

Esperanto-Instituto de Zairio (S-ro Nduantoni Bakidila Ngangu, B.P. 13, Lukala, Zairio) entreprenis diversajn agadojn por konigi la internacian lingvon, interalie pere de paroladoj.

Amasa junulara renkontiĝo en Hungario :

Kvankam la Junulara Esperanto-renkontiĝo de Hungara Esperanto-Junularo jam okazis komence de Majo, konvenas skribi iom pri ĝi, ĉar ĝi kunigis preskaŭ 700 partoprenantojn en la apudlaga urbo Tata (estis proksimume 100 eksterlandanoj el diversaj landoj). La programo estis tre riĉa kaj varia.

Lingvistiko pri Esperanto :

En Germana Demokratia Respubliko, eminenta lingvistiko de internacia reputacio, Prof. D-ro Georg Friedrich Meier, en parolado en Centra Laborrondo Esperanto, prelegis pri « Aspektoj de internacia lingva komunikado, kun pledo por la solvo de lingvoproblemo helpe de planlingvo ».

Fiŝoj, fiŝkaptantoj kaj frandemuloj en Anĵu

Sciencistoj asertas, ke niaj plej foraj praavoj, el la tempoj, antaŭ miliardoj da jaroj, kiam nia planedo estis surkovrita de akvo, estis fiŝoj. Ni lasu tiun temon al kleraj fakuloj. Pli modeste, mi nur tendencas supozi, ke se ni havas tiel « familiajn » rilatojn kun fiŝoj eble povus esti amuza zigzagadi kune kun ili, se ne en akvo, kio ankaŭ povas esti agrabla kiam sufiĉe varmas, almenaŭ mense tra diversaĝaj kaj diverstemaj aludoj al rilatoj : homoj — fiŝoj. Ne nur tiuj de kaptantoj kaj kaptitoj aŭ tiuj de gustumantoj... kaj kuiritoj ! Ve ! Tiel degeneris, plej ofte, la interrilatiĝoj ! Nun, ŝajnas ke nur fiŝo-specioj por akvarioj konservas honestan rolon inter la homoj ĉar aĉetitaj por hejma kunvidado ne por gustumado. Ni revenu subĉiele en la malnova franca provinco Anĵu, kie situas nia verda « Gresillon » ĉirkaŭata de riveretoj, kie ankaŭ fluas la Luar de kelkaj kvalifikata « maldiligenta », de aliaj « majesta », kiu diversmaniere inspiris poetojn kaj pentristojn. Ĝi trairas Anĵu, kiun ĝi trancas en du partoj, unu norda, unu suda. Survoje ĝi volonte akceptas alfluojn mem nutritajn de multnombraj riveretoj. Sekve, meze de kvietaj pejzaĝoj, kaj riĉaj agrokulturoj, la fiŝkaptantoj povas, dank'al tiel densa kaj diversgrada river-reto, provi praktiki sian preferatan sporton tre diversmaniere : Ja, ni kuraĝas paroli pri sporto, eĉ se la praktikantoj pli serĉas vivrimedon per vendo de la kaptado... aŭ tute ripozeman plezuron ! Ĉe la ombro de la arboj, kiuj ĉirkaŭas herbejojn aŭ kampojn, laŭlonge de sunbanitaj sablaj strandoj, sur baraĵoj kiuj digas la sablon, en barkoj meze de la rivero mem, fiŝkaptantoj povas elekti lokojn laŭ siaj plaĉoj, ankaŭ kaptmetodojn, kaj per taŭgaj iloj kapti specimenoj de la dezirata fiŝo-specio.

Tamen, ne laŭlonge de la tuta jaro ili povas tion fari. Ja, protektado de la river-faŭno tre rapide iĝis plej necesa por la konservado de la specioj. Sekve, dum la periodoj de fiŝ-reproduktado kaj alvusumado, tiam la kaptado de la generantoj kiel tiu de la idoj estas nepre malpermesata, zorge kontrolata, severe punata. (Cetere, same pri kankroj kaj ranoj kiuj, kvankam ne fiŝoj ankaŭ vivas en kelkaj el niaj riveretoj). Periodoj de malpermeso pri la kapteblecoj povas varii laŭ la fiŝ-specioj kaj ties reprodukt-periodoj. Aliparte, la fiŝkaptantoj, eĉ se nur amatoroj, devas aliĝi al federacio, do pagi kotizojn kiuj nutros kason celantan al riĉigo de la akva faŭno kaj al la prizorgado de la river-bordoj. Alia mapermeso (eble pliaj ?) sin altrudas al ili kiam temas pri riveroj klasifikitaj kiel navigeblaj akvo-vojoj : Ili rajtas fiŝkapti nur de kvin kilometroj malproksimen de baraĵoj. Sed, se strikta organizado submetas niajn fiŝkaptantojn al devoj, kompense, dank' al kontentiga fiŝkulturo kaj bredado, efika kontrolado de la riveroj kaj akvobasenoj, rare, almenaŭ laŭdire, ili nenion povas trafi. Plue, ili povas ĝui kolektivajn distrojn aranĝitajn de la federacio : konkursoj inter fiŝkaptantoj kaj aliaj popularaj festoj en rilatoj kun tiu sporto.

Do, bone informataj kaj obeemaj je la reglementado, kion povas trovi niaj Anĵuanoj ĉu en fiŝ-retoj pli malpli grandaj aŭ diversformaj, ĉu ĉe ekstremaĵo de kaptilo ? Sur la akva fundo el fajna sablo de Luar, ankaŭ en lokaj riveroj, vivas perkoj, tinkoj, bramoj, gobioj, barbioj, kiujn oni retrovas en la famkonataj, bongustaj « fiŝ-fritaĵoj el Luar ». Angiloj, serpent-formaj fiŝoj kun muka kaj skvama haŭto sed ŝatinda karno, plej ofte eniras la Anĵuajn menuojn je nomo « bouilleture d'anguilles », konsistanta el angil-pecoj stufitaj kun antaŭ-sekigitaj nigraj prunoj : Raraj estas tiuj, kiuj ne reprenas el la plado post unua gustumado. Ezoko, tiu rabofiŝo, kies dorsa naĝilo staras tuj antaŭ la vosto, volonte nomita de la gastronomoj « La reĝa fiŝo » estas, plej ofte prezentata sur la regionaj manĝotabloj akompanata de la loka saŭco nomita « la blanka butero ». La rivera petromizo, malpli granda ol la mara, printempe almontiras en riveroj.

Nur de kelkaj dekoj da jaroj, oni enigis en anĵuajn akvojn la sandron, je tre bongusta karno, antaŭe vivanta ĉefe en pli centr-orientaj Eŭropaj riveroj. Tiu fiŝo estas rekonebla pro ĝia malalta antaŭdorsa naĝilo, ĝi povas esti unu metron longa. Mi ne povas silenti pri karpoj, tiel longvivaj laŭdire ; pri trutoj je karno tiel bongusta. Certe, mi forgesas kelkajn pliajn vivantaj pli malpli paceme en niaj riveroj : Ja, fiŝoj, kiel homoj, povas inter si esti sufiĉe kruelaj. Estas aliaj migremuloj kiuj ne hezitas trairi milojn da kilometroj en salaj marakvoj kiel en la riverakvoj. Oni bone scias, ke salmoj el la klupeoformaj fiŝoj, kun bongusta rozkolora karno, ordinare vivas en la maro sed frajas en riveroj same kiel la alozoj, alia granda okcident-Eŭropa specio de klupeoj, koneblaj per vico de malhelaj makuloj ambaŭflanke. La salmoj, grandaj fiŝoj karnovoraj, krom insektojn kiuj falas en akvon kaj de ili tre ŝatataj, ankaŭ mangas aliajn fiŝojn. Ordinara salmospecio povas esti unu metron longa kaj pezi ĝis dudek kilogramoj. Ĝi trapasas la unuan parton de sia alvusa vivo sur la loko mem de la patrina ovodemeto kaj eloviĝo. Kiam unu jara kaj duono, aŭ dujara, la juna salmo, tiam dek aŭ dekdu centimetrojn longa, kvardek gramojn peza, iras al la maro kie ĝi restadas de du ĝis kvin jaroj, tre rare malpli ol du.

Tie vivantaj en profundaj akvoj, la salmoj rapide dikiĝas antaŭ ol reveni al eniroj de riveregoj por almonten iri kaj siavice ovodemeti en freŝaj akvoj konvene aerumitaj. Sed la frajado ege malfortigas ilin kaj ne multaj reiras al la maro ; aliaj pereas dum la reir-vojaĝo. Aliparte, establoj de uzinoj, kiuj, ĉe bordoj de riveroj uzas tiujn-ĉi kiel rubujojn, enkondukas gravajn malaperojn de tiuj fiŝo-specioj. Ĉar la salmoj konstante almontiras la samajn akvo-vojojn necesas ne bari al ili la vojon kaj okaze de konstruado de uzin-baraĵoj nepre necesas disponigi alirejojn al la salmoj. Oni nomas ilin fiŝ-eskaloj, kiuj konsistas el lignaj deklivoj aŭ septoj por permesi al la migrantaj fiŝoj, aparte el la salmoj, pli facile transsalti la maloportunajn river-obstaklojn. Oni fiŝkaptas, krom dum februaro kaj marto, pere de retoj aŭ de fiŝfadenoj.... kondiĉe ke tiuj-ĉi estu sufiĉe fortaj ! Kiel hoko-logaĵoj oni uzas fiŝeton, ĉu vivantan, ĉu mortan, specon de brila kulereto movanta kiel fiŝo aŭ artefaritajn. La granda, ni povas diri la industria salmo-fiŝkaptado en Luar estas rezervita al proksimume dekduo da profesiuloj. Ĉiu-

jare, ĉe epoko de la salmo aŭ alozo almontiradoj, oni povas vidi sur Luar, je la granda miro de la turistoj, grandajn barajojn kaj fiŝretojn de tiuj fiŝistoj kiuj ĉefe provizas restoraciojn, ankaŭ konservejojn.

Kiel oni povas supozi se nun la fiŝkaptado en riveroj pli montras sportan aŭ distreman flankojn, pli gastronomian uzon ol viv-neceso, ne same estis en pasinteco kiam al multaj homoj mankis mono, propra grundo por kultivi, ankaŭ transport-rimedoj. Tiam la riverbordanoj, en Anĵu kiel alie, grandparte vivis pere de fiŝkaptado, ĉu por nutri sin mem kaj familianojn, ĉu por vendi aŭ interŝanĝi. Tion faris ne nur senmonuloj ankaŭ religiaj establoj, eĉ riĉaj posedantoj, okazantaj aŭ konstantaj loĝantoj en bienoj apudaj al riveroj aŭ lagetoj. Tute spontane, tiu vivrimedo, samtempe sporto favora ne nur al spertuloj ankaŭ al bonŝanculoj aŭ al sagacaj observantoj de la fiŝaj kutimoj kaj de la lokoj, enkondukis popularajn rakontojn, kanzonojn el kiuj kelkaj restas vivantaj en nia loka folkloro, ludojn kaj konkursojn. El ili, kiu restas plej fama en la Anĵuaj rememoroj estas la tiel nomita : « Baillée des filles ». En malnova franca lingvo la vorto « baillée » (baje) povis signifi ĉŭ donacon tiuokaze al kaj de junulinoj, ĉu sejnon trenreton ankaŭ la ago mem uzi trenreton. Do ambaŭ sencoj valoras.

Tiu ĉiujara ina konkurso okazis en « Les Ponts-de-Cé » urbeto ne malproksima de Angers, kies fortika kastelo estis konsiderata de la Anĵuaj dukoj, dum pacaj tempoj, kiel kampara restadejo super panoramo de Luar-bordoj, kies preskaŭ ĉiuj loĝantoj, rekte aŭ ne vivis pere de fiŝkaptado. Laŭdire, estas la famkonata « Bona Reĝo Renato de Anĵu » kiu, je la dekkvina jarcento, kreis tiun konkursfeston. Por rekompenci la plej lertan el la filinoj, dekok, dudek-jaraj, de la lokaj fiŝistoj. Al la plej sperta, aŭ bonŝanca, al tiu kiu kaptis ĉu plej dikan fiŝon, ĉu plej grandan kvanton, la duko donis kison por marki efemeran titolon de « Reĝino de la fiŝkaptado »..... akompanata de doto, kondiĉe ke ŝi edziniĝos al fiŝkaptisto. Sekvis subĉielaj popularaj festoj : manĝado de la fiŝrikoltoj kuiritaj surloke, kantoj, dancoj, kio permesis ne nur al la dotita junulino, ankaŭ al aliaj junaj belulinoj akordiĝi kun fianĉoj !

Aliparte, longdaŭre, la memoro de la bona reĝo Renato restis fama inter la fiŝkaptistoj ĉar mem li tre ŝatis el barko etendi retojn ; Sekve, al ili neniuokaze, li rifuzis sian dukan helpon. Li eĉ permesis al siaj amikoj, tre granda honoro al ili, partopreni en la religia, ĉiujara procesio de Di-festo, kaj tie kunporti propran profesian emblemon konsistantan el speco de kandelego, vere enorma kaj peza, dekoraciita je bildo de Sankta Petro tenanta fiŝreton kaj de aliaj meti-iloj. Tute supre de tiu torĉo estis cirklo el ligno kun pendantaj kaj dancantaj artefaritaj fiŝoj divers-speciaj, intermiksitaj kun sonorileto j. La duko Renato, kiu de la fiŝistoj estis ricevinta la titolon de « Reĝo de la plotoj » (ploto estas riverfiŝo konebla per proksimume kvardekstri skvamoj sur la flanka linio) ne nur prezidis popularamuzajojn ankaŭ, pli serioze, fiksis korporaciajn leĝojn. Ambaŭ ne povis morti kun la inicianto. Ja, oni devas koncii, ke la iamaj meti-korporacioj ne celis unike al distrado de la anoj ! Ne. Tiuj societoj de sam-metianoj aŭ profesiuloj, posedantaj la rajton de leĝa persono, submetis siajn membrojn al kolektiva disĉiplino. Sekve, kiel korporaci — membroj ankaŭ la fiŝistoj devis subskribi lern-servokontrakton. Kiam mastro-fiŝisto tiel akceptita ne nur de la internaj korporaci-estroj, ankaŭ de aliaj korporaci-estroj kiel egalulo, kun rajto siavice dungi subulojn kaj metilernantojn plie devis esti akceptata de la loka nobel-sinjoro, posedanto kaj nura disdonanto de la fiŝkaptad-rajto. Nur de tiam la korporaci-estro rajtis ricevi la necesajn leter-atestojn validajn nur interne de limigita riverteritorio submetita al kontrolado de oficistoj, kiuj okaze de malobeemo al subskribita kontrakt-reglementado povis konduki la fraŭdemajn fiŝistojn al juĝantaro.

Aliparte, ĉe epoko de intensa komercado pere de akvo-vojoj, oftege la fiŝkaptistoj interŝanĝis malamikajojn kun la ŝipistoj, kelkfoje gravajn disputojn sekvatajn de procesoj. La navigantoj volonte plendis pri tro ampleksa uzado de angil-retoj kiuj baris la akvofluon, pri tro multaj nasoj el salikaj vergetoj instalitaj funde de riveroj por kapti fiŝojn kaj tie fiksitaj per lignaj pilieroj ne ĉiam facile videblaj, pri uzo de flosantaj basenoj por la konservado de vivantaj fiŝoj kiuj konsistis el barĝoj kun internaj apartajoj kaj truoj por ke senĉese estu, dank'al konstanta akvofluo, renovigado de konvena elemento nepre necesa por la konservado de ege pereivaj varoj. Tiaj fiŝ-rezervujoj ankaŭ povis kon sisti el salikaj kaĝoj grupitaj kaj alkroĉitaj al barajo en la akvofluo. Se ni konsideras ke ĉirkaŭ la jaro 1850 ankoraŭ ekzistis, borde de Luar fiŝejo grupiganta de marto al majo ses cent ĝis sep cent kaptiston instalitan en kabanoj sur la strando por surloke manovri sejnojn aŭ trenretojn, oni povas konscii pri la ĝeno alportata al la ŝipnavigado de tiom da aparatoj por kapti aŭ konservi la fiŝojn.

Unu jarcento pasis, kaj la ĉesado de la rivertrafiko, anstataŭ de la fervoja, ter — kaj aer komerc-transportadoj, lasis grandan liberecon al la fiŝkaptantoj. Kaj nun, stange, ni alvenas al tempo kiam estas la fiŝistoj kiuj ege grumblas pro relanĉado de rivernavigado fare de turismaj kaj komercistaj organizajoj. Ili riproĉas al la perturbantoj la rapidecon de kelkaj boatoj kiuj tro movigas la ondojn kaj tiel detruas la ov-demetojn, la alvusojn, la fiŝetojn kaj en pli malpli longa daŭro riskas difekti la riverbordojn. Ankaŭ la motor-bruoj forpuŝas la fiŝojn al pli sekuraj fundoj, kpt... kpt...

Verŝajne, la kontraŭuloj repaciĝos almenaŭ momente, ĉe manĝo-tablo kunportanta allogajn Anĵuajn fiŝ-specialajojn... kaj samdevenan vinon !

Ĉu ezokon kun blanke fandita butero oni proponos al ili ? Mi liveras al vi la sekreton de la saŭco, fakte miksajo, kiu je konvena varma grado, kuirata ne rekte sur forno-fajro sed en mariabano, konsistas el solvita butero aldonata al hakitaj aksalonoj antaŭkuiritaj en vin-vinagro... sed... sed, ankaŭ bezonas la arto de la saŭcisto, plej ofte ino. Ne nur ezokon, ankaŭ salmon, sandron, alozon, multajn aliajn fiŝojn kuiritajn en spic-buljon povas akompani tiu saŭco. Ankaŭ de longe konata en la Anĵu kuir-arto estas la patromizo stufita je la loka maniero, ofte akompanata de kuirita kaj kremita okzalo. Ja, patromizo entenas sufiĉe da fiŝostoj, sed okzalo entenas oksalatan acidon kapablan solvi kalkon, do, niaj kuiristoj trovis plej bonan kompenson por enstomatigi al siaj gasto kun eventualaj malagrablajoj ankaŭ tujan rimedon. Estas la angilpasteĉo, la jam menciita « bujtur », kaj multaj aliaj allogajoj el fiŝ-karno.

Venu kaj gustumu !

B. CHEVERRY.

Klarigojn pri fiŝo-specioj ni trovis en P.I.V.

ĈU LINĈADO ESTA FONTO DE LA HOMA KULTURO?

Enkonduko

Kiam G. Waringhien verkis eseon « Ni kaj Ĝi », en antaŭparolo, li avertis, ke la religia parto de tiu verko ne estas destinita al la kredantoj, kaj li klarigas, ke, religie edukita, li sentas, ke « mankas al (li) religia instinkto ». Mia situacio estas ĝuste inversa : senreligie edukita, mi sentas en mi religian instinkton, kaj mi daŭre serĉas religion, kiu povus pace rilati kun homaranismo kaj scienca metodo.

Iu antaŭulo de G. Waringhien, Volter' (Voltaire) asertis, ke « la unua reĝo estis bonŝanca soldato », kaj, ke : « se Dio kreis la homon laŭ sia bildo, la homo larĝe reciprokis ». Tiuj asertoj valoras por la reĝoj konataj de Volter', kiuj konkeris la povon milite, kaj por la kristana religio, kies Dio estas plurpersona. La celo de tiu artikolo estas montri, ke, laŭ sciencaj principoj, la Volteraj konoj estas nur parto de pli ampleksaj nocioj pri reĝeco, religio, kaj pli ĝenerale « homa kulturo ».

Ĝis la 19-a jarcento, la homoj ĝenerale klarigis la historion de sia specio pere de religiaj rakontoj. Ekzemple, la Eŭropanoj, sub la influo de Kristanismo, ne dubis pri la Biblia rakonto de la « Genezo », kaj oni kutime taksis je ses mil jaroj la aĝon de la homa estajo.

En la 19-a jarcento, post la franca revolucio, kiu iom plimalfortigis la premon de kristanismo kaj permesis la tradukon de la Egiptaj hieroglifoj, post la influo de Lamark (Lamarck), kiu iniciatis transformismon, okazis du gravaj eventoj pri la historio de la homa specio. En 1844 Buŝe de Pert' (Boucher de Perthes) rekonis en silikaĵoj homajn ilojn, kiujn li datis de « antaŭ la diluvo », kaj en 1859 Darŭin (Darwin) prezentis alian teorion pri transformismo, kiu permesis eĉ kredi, ke homo estas transformita simio. Spite al la skandalo en religiaj medioj, la scienco antaŭeniris, kaj okaze de la kolonia invado de Afriko kaj Ameriko, la scienculoj studis atente la indiĝenajn morojn. De tiu epoko datumas la unuaj studoj pri la « primitivaj » socioj, kaj la etnografoj kaj etnologoj priskribis, ne nur la sociajn kondutojn, sed ankaŭ la mitojn, kiuj pravigas la ritojn. Oni konstatis, ke la mitoj kaj la ritoj de la tiamaj « sovaĝaj » popoloj similis al tiuj de la praaj civilizacioj, konataj aŭ per historio aŭ per la arkeologio, kiu postsekvis la verkon de Buŝe de Pert'.

La unuaj etnologoj montris, ke, inter la homa socio kaj la socioj de la mamuloj, estas du gravaj diferencoj : la homa kulturo karakterizigas per la uzo de iloj, kaj per la religiaj kondutoj : entombigo de la mortintoj, uzo de magio, praktiko de ritoj, kredo je mitoj kaj respekto de malpermesoj (tabuoj). En 1913 Frojd (Freud) verkis la libron « Totemo kaj tabuo », kie li proponas psikanalizan klarigon de la ritoj kaj mitoj. Ĉirkaŭ 1960, en diversaj verkoj, Levi-Ŝtraŭs (Levi-Strauss) prezentis novan klarigon, pere de strukturalisma studo de la lingvoj : Tia estis la stato de la konoj, kiam en 1972 Renato Ĵirar (René Girard) publikigis libron : « Perforto kaj sakralo » kiun sekvis en 1978 « Aĵoj kaŝitaj depost la fondo de la mondo ». Tiu tezo kontraŭdiras la antaŭajn kredojn, kaj mi taksemas ĝin valora, ĉar ĝi kunligas etnologion kun pribesta etologio, kaj tiel permesas klarigi la transiron al la homa kondiĉo, kaj prilumi la « fonton » de homa kulturo. Mi prezentos tiun tezon kun ĝiaj etnologiaj konsekvencoj, sed flankenlasante la psikologiajn, kaj speciale la kritikon de psikanaliza teorio de la homa psikologio.

Pri la mitoj

La unua interpretado de la mitoj estas la plej simpla : oni kredas ilin tute veraj : la « kredantoj » opinias, ke la realaj faktoj estas ĝuste priskribitaj en siaj mitoj, dum ĉiuj aliaj mitoj estas nur falsaĵoj, kiuj erarigas la aliajn homojn. Tiu sintenado troviĝas en ĉiuj religioj, kiu ajn estas ĝia situo inter la plej naiva kaj la plej filozofia.

Kontraŭe, oni povas opinii, ke la enhavo de la mito estas sensignifa, nur la uzo de la mito, ĝia formo estas interesaj por klarigi, alimaniere, la realaĵon. Tia estis la ĉiama konduto de la nekredantoj, (ankaŭ de la kredantoj je aliaj mitoj), kiuj trovis por la antaŭa mito novan klarigon, kiu, fakte, kreas novan miton. Inter la plej modernaj mitoj eltrovitaj por kontraŭdiri la antaŭajn, oni povas citi : la kredon je « bona sovaĝo » (Ruso') (Rousseau), kiu kontraŭdiras la « originan pekon », la kredon pri « ĉiopovo de la scienco », kiu kontraŭas « obskurantismon », kaj la lastan formon de materialismo, kiu pretendas ĉion klarigi pere de « klasbatalo ». Ĉiuj scias, ke pro la klasbatalo, la « kredantoj » trudis fantazian genetikon en la tempo de Lisenko, Stalin' sammaniere kondamnis Esperanton. Ĉiuj ankaŭ scias, ke el la greka mito de Edipo, oni tiris ne nur dramojn (la fato-maŝino prezentita do Tespa), sed ankaŭ novan miton psikologian, kiu etendiĝas ĝis antropologio kaj baziĝas sur familia seksa rivaleco.

Inter tiuj absolutaj akcepto (kredo) kaj rifuzo, oni rajtas sin demandi ĉu la enhavo de la mito estas sensignifa, ĉu nur la formo de tiu mito instruas por la eltrovo de la naskiĝo de la homa penso, kiel hipotezas la strukturalistoj.

Se la celo de la mito estas nur konkretigo de lingvistika diferencado, kial ĉiuj mitoj rakontas kolektivajn murdojn ? Se la mitoj nur reprezentas la familiajn seksajn konfliktojn, kial la viktimoj de la murdoj estas ofte fremduloj, nekonatuloj aŭ kripluloj ? Ĉu ne eblas trovi racian interpretadon de la mitoj per studo de la karakteriziloj de tiaj kulturoj : la ritoj kaj la tabuoj ?

Prahomaj kulturoj kaj bestaj socioj

Kiam oni studas ritojn kaj tabuojn, la unua impreso estas kontraŭaĵo. Dum periodoj pli malpli longaj, pluraj precizaj agoj estas malpermesitaj, aŭ seksaj rilatoj, aŭ manĝo de specialaj varoj. Kaj iam, ĝuste okaze de la rita celebrado, la tabuoj estas forigitaj, la homoj vigle ekscitiĝas, ŝajnigas grandan batalon, aŭ organizas militistajn dancojn... k.t.p., kaj tio finiĝas per solena ofera rito, post kiu la homoj repacigitaj retrovas la kutimajn leĝojn kun ĉiuj ordinaraj tabuoj. Iuj aludos pri malstreĉiĝo, provizora necesa liberigo de la instinktoj, sed tiuj pure psikologiaj klarigoj ŝajnas sen rilato kun la ofero. Aliaj diros, ke la ofero donaco al Dio, kiu koleris pro malrespekto de la malpermesoj ; sed tiu klarigo, tipe juda, ne povas klarigi la sintenon de homoj kiuj neniam imagis tian dion, kiu estas la juda dio. Kaj cetere, kial sur la tuta mondo la homoj vivas socie en tiu alterno ? Oni povas eltrovi miton, kie du « personoj » opozicias, kiel Ahura-Madzo kaj Arimano, Javeo kaj Satano k.t.p., sed ĉu ne estus pli racie serĉi sciencan solvon en la studo de la bestaj socioj, kiel studas ilin etologio ?

En la socioj de mamuloj, la bestoj emas same konduti, imiti unu la alian. Sed kiam tiu imitemo celas alproprigon, ĝi tiam naskas rivalecon. Ĉiu scias kiel solviĝas tiaj rivalecoj inter la mamuloj : la virbestoj interbatalas, la venkinto fariĝas ĉefo, superulo, dum la aliaj iĝas subuloj. En iaj specioj, la subuloj foriras de la socio, sed en aliaj ili restas apud la ĉefo, imitas ĝin por ĉio, krom pri alproprigo. Oni povas hipotezi, ke ĉe tiaj bestoj, la imiteman instinkton inhibas alia instinkto socia, kiu permesas la pluvivon, kaj de la subulo, kaj de la tuta grupo. Kiam oni observas simiojn, kiuj estas plej imitemaj, oni povas konstati, ke la imitemo estas tiel potenca, ke la alpropriga gesto ekas, antaŭ la bremsado fare de la « socia instinkto ».

Oni tiam povas imagi, kaj, laŭ mi, tio estas la kerno de la tezo, ke dum la jarmiloj de la transiro de simio al homo, kiam vivis tiaj strangaj estaĵoj, kiuj sekvas sin de Aŭstralopitekoj ĝis « Homo Sapiens », tra « Homo habilis », Pitekantropoj kaj « Homo Neanderthalensis », la kreskado de la cerbo kaŭzis plifortigon de la imitemo, kiu fine superis la inhiban socian instinkton de la bestoj. Oni povas pravigi tion, observante grupon de nuntempaj junaj infanoj. Se oni disdonas ludilojn, ĉiu deziras havi saman ludilon kiel tiun de la najbaro, kaj, se la plen-

kreskuloj ne alportas « kulturan » influon, senfinaj kvereloj okazas inter la infanoj. Sed la prahomoj ne estis infanoj, ili kapablis uzi siajn fortojn, kaj uzis armilojn el ŝtono... tio permesas imagi, ke dum multaj jarmiloj la homoj kruele sin buĉis reciproke. Oni povas argumenti, ke ankoraŭ nun ekzistas militoj, sed ĝuste, kion oni nomas civilizacio, aŭ homa kulturo, celas pacigi la homojn, ĉesigi, almenaŭ provizore, la militemon de homo. Eblas pensi, ke samcelis la praaj civilizacioj. Kaŭzis la senĉesajn batalojn la rivaleco interhoma kaj ĝenerala, pri la havaĵoj tuj disponeblaj ; tial oni povas pravigi la tabuojn, kiuj ĝuste malpermesis uzi tiajn aĵojn. La socian inhiban instinkton de la bestoj anstataŭis socia premo : la tabuoj. Sed kion diri pri la ritoj ? Se oni konservas la hipotezon de prahomaro terurigita de senĉesa milito, oni rajtas plue konjekti, ke iam la homa grupo transdonis al unu homo el la grupo la respondecon de tiu abomena situacio ; tiam la tuta grupo ariĝis, kaj kune, fratece, la homoj kolektive murdis la viktimon. Post tiu murdo, la homoj sentis sin fratoj, pro tiu kunlaboro, tiu praa kooperado, kaj la paco revenis, kun la tabuoj. Antaŭ la murdo, la viktimon oni sentis kulpulo, respondeculo, sed post la murdo, la sama viktimo fariĝis la fonto de la paco, tiu, kiu alportis la feliĉon, kaj la homoj dankis tiun viktimon, kiu ŝajnis la savanto de la popolo, kaj pro tio estis sakrala. Fakte, tiu sento pri sakralaĵoj ekzistas en ĉiuj socioj, ĉiuj kulturoj, same kiel aperas en iliaj mitoj la murdo.

Oni povas tiam pli racie interpreti la mitojn. La rakontoj ne estas veraj, kiel opinias la kredantoj, ili ne estas fabelaj lingvaj ekzercaĵoj, sed raportas pri reala fakto, maskita de popola tradicio, sed kiu vere okazis, murdo paciga, kiu ekzistis en ĉiuj homaj socioj, kaj kiu estas teatre prezentita en la ritoj. Kio estas lingve en la mitoj, tio estas geste en la ritoj.

Evoluo de la diversaj sociaj institucioj

Pere de tiu interpretado de la naskiĝo de homaj civilizacioj, eblas klarigi ĉiujn homajn institucionjn, sed mi nur citos tiujn, kiuj ŝajnas al mi plej gravaj.

La religioj, kompreneble, estas la filinoj de tiuj praaj mitoj kaj ritoj. Laŭ la cirkonstancoj, la ritoj ŝanĝiĝis ; se la meksikanoj en la 16-a jarcento post Kristo, ankoraŭ oferis homojn, en aliaj lokoj, ekzemple ĉe la grekoj kaj romianoj, bestoj estis oferitaj ; aliflanke, oni anstataŭis la kolektivan murdon per ofero efektivigita de pastroj, sed tiu pastro agas je la nomo de ĉiuj, kaj ĉe la kristanoj, ekzistas ankoraŭ komunio por ĉiuj pri eŭkaristio, kaj per hostio, kies etimologio latine « hostia » signifas « viktimon ».

La reĝeco, per sia sakrala karaktero parencas kun religio. Se oni studas, ne la modernajn monarkojn, sed la reĝojn de la plej primitivaj socioj, oni konstatas, ke temas pri estontaj viktimoj, kiuj ĝuas provizore pri esceptaj privilegioj, ekzemple seksaj, sed atendante la oferan morton, kiun kutime sekvas komuna manĝo de la viktimo. Eblas pensi, ke la reĝoj, kiuj sukcesis akiri daŭran povon, ne estas bonŝancaj soldatoj, sed estontaj ritaj viktimoj, kiuj sukcesis malfruigi la oferon sufiĉe, por profiti, kiel eble plej longtempe, pri la transcenda supereco ligita kun la sakrala povo de estonta viktimo. Oni tuj komprenas, kial tia povo estas absoluta. Je la alia ekstremo de la eblecoj, oni rajtas opinii, ke la glaseto da rumo kaj la cigaredo, kiujn oni proponas al la francaj gilotinotoj, estas donaco, kiu rekompencas tiun, kiu per sia morto sekurigos la socian pacon.

La rilatoj inter homoj kaj bestoj estis ofte klarigitaj per la materiaj bezonoj de la homoj, kiuj serĉis vane nutraĵon. La fakto, laŭ kiu, pro sia besta korpo la homo estas ĉiomanĝanto precipe vegetarana, iom ŝancelas tiun hipotezon, sed oni povas aserti, ke dum la teruraj periodoj de glaciaj epokoj la vegetarano fariĝis viandmanĝanto pro neceso. Tamen, multe pli interesa estas la studo de la rilatoj inter homoj kaj bestoj en « primitivaj socioj ». Ekzemple, en iu popolo, la totemo estas ursido. Tial la homoj ŝtelas ursidon junan, kaj gardas ĝin kun ili, la virinoj mamnutras ĝin, ĝi estas laŭrite « homo ». Kompreneble, dum tiu antaŭofera periodo, la ursido vivas kun la homoj same kiel niaj nunaj dombestoj. Kaj iam, okazas la rito, oni mortigas la ursidon kaj manĝas ĝin. Ĉu pro malsato, tute ne sed por akiri magian povon, ĉar tiu besto estas totema... k.t.p. La fakto estas, ke urso ne estas malsovaĝigebla, kaj la ofero devas okazi en sufiĉe juna aĝo ; sed oni rajtas opinii, ke, se temus pri hundo aŭ bovino, tiu vivo komuna, pro ritaj postuloj povus instigi al plua kunvivo, kaj... poste uzado de laborforto, de lakto, aŭ de karno. En la homa historio, materiaj postuloj sekvas la religiajn en multaj okazoj ; kial ne ĉi tie ?

La interŝanĝoj inter homaj grupoj estis rimarkitaj de la unuaj sociologoj, kiuj opiniis, ke la interŝanĝo estas karakterizilo de la homaj rilatoj. Sed tio estas fakto, ne pravigo. La materialistoj aludis pri kompletigaj bezonoj... sed, denove, tiu klarigo ne rezistas al sistema observo. Kial tiuj, kiuj produktas nutraĵojn, posedas virinojn bezonus interŝanĝi nutraĵojn kaj virinojn kun la najbaroj ? Kaj kial ili interŝanĝus la kadavrojn ? Sed ĉio klariĝas, se oni pensas pri la deveno de la homa rivaleco : imiti la najbaron en alproprigo de la havaĵoj. La nura rimedo kontraŭ tiu instinkto, ĉe la homoj, estas la tabuoj kaj pro tio oni tabuigas la tujajn havaĵojn. La homoj kiuj produktas tian manĝaĵon ne rajtas ĝin manĝi, la homoj, kiuj vivas apud virinoj, ne rajtas ilin sekse uzi. La interŝanĝoj fontas el la tabuoj, kaj oni povas klarigi pri la kadavroj, pro la timo de la homoj antaŭ samgentaj kadavroj, eble pro rememoro de la origina murdo.

Cetere, la mortintoj, pro la subkonscia efiko de la unua murdo, estas samtempe terurigaj kaj sakralaj. Tial, laŭ la lokaj evoluoj, oni jen interŝanĝas la kadavrojn, jen manĝas ilin por konservi la magian efikon, jen pluvivigas ilin per entombigoj. Ĉar la unua sakralulo estis mortinto, oni ne devas miri, se en iuj gentoj, ĉiuj mortintoj estis dioj.

La malkovro de la sekreto

Kiam la mito estas vivanta, la rakonto de la linĉado estas farita de la linĉintoj mem, kaj kompreneble, ili asertis, ke la viktimo estis kulpa. La vidpunkto de la viktimo aperis unuafoje kun la rakonto, fare de Platono, pri la « morto de Sokrato ». Sokrato diris sin ne kulpa, sed li akceptis morti por la savo de la socio. Poste venis la evangelistoj, kiuj rakontis la morton de Jesuo, kiu, kiel Sokrato, diris sin senkulpa, sed tamen klarigis ke lia morto savos la homaron. Tiaj mortoj okazis antaŭ nelonge en la komunistaj landoj, kiam viktimoj diris sin kulpaj, por ricevi morton, kaj tiel savi la revolucion. En la « modernaj » socioj, oni ne plu aŭtomate kredas la linĉintojn, oni dubas, oni protestas, tial la kulpigoj aperas kiel persekutoj ; oni konas historie, ekzemple tekstojn de kristanoj, kiuj mezepoke akuzis la judojn, okaze de pesto, sed ĉiuj diras nun, ke temas pri persekutoj. Tial, en la civilizacioj kie estas duboj kaj scivolemo, ne plu estas mitoj daŭraj, ili rapide aperas kiel persekutoj ; kontraŭe, en aliaj gentoj, ŝajnas, ke ne estas persekutoj, ĉar fakte tiuj persekutoj alivestiĝas en « poeziaj » mitoj.

Racio necesas por forigi la mitojn, sed ĝi ne sufiĉas, ĉar en raciaj sistemoj, tamen ekzistas modernaj mitoj racie vestitaj : naciaj, klasaj, rasaj ; ili ĉiuj kondukas al murdoj. Ĉar ni nun konas la sistemon, per kiu la homoj kulpigas viktimon instigi provizoran fratecon per kunmurdado, la nura solvo estas rifuzi ĉiujn mitojn kaj anstataŭigi la permurdan fratecon de pli firma kaj pura frateco. La rito de tia frateco estas racia kooperado kaj ĝia mito estas la amo.

F. BOYET.

Vorto ne trovebla en P.I.V.

« sakrala » : apartigita for de la komuna uzado pro religia karaktero kaj inspiranta respektoplenan timon ; malprofana.

(Tiu vorto estis enkondukita de G. Waringhien en « Ni kaj Ĝi »).

Antaŭ kvindeko da jaroj, la unuaj aŭtomobilaj rekordoj en Montlhery



Estis en 1923. Alexandre Lamblin estis ekzamenanta la mapon, kiu reprezentis la bienon de S-ta Eŭtropo ; tiu ĉi konsistis en 850 hektaroj da arbaroj, kampoj kaj tri farmoj ; ĝi situis preskaŭ tute sur la komunumo Linas apud Montlhery kaj distanca de Parizo je 28 kilometroj.

« Jes, ekzakte tio, kion mi deziris » li diris. Alexandre Lamblin estis viro dika, barbhava, gajmiena. Li estis naskiĝinta en Ronchin, apud la urbo Lille, en nord-Francujo. Lia uzino en Neuilly estis fabrikinta la radiatorojn por la aviadiloj de la Unua Mondmilito ; ĝi ankoraŭ fabrikis radiatorojn ; ĝi havigis al S-ro Lamblin grandegan riĉaĵon.

Li deziris dediĉi tiun riĉaĵon al la kreado de unu aŭtodromo ; la plej granda en la mondo.

Li tiele planizis : « Tie ĉi, dekstre, la aŭtovojo ĉirkaŭos 10-hektaran terenon, sur kiun mi instalos aliajn sportejojn por futbalo, rugbeo, teniso, atletismo. Ekstere estos golfejo. Tie estos restoracio. Kaj rande de la nacia strato, mi starigos novan urbon : estos Lamblin-urbo. »

Tia estis la grandioza revo de Alexandre Lamblin. Certe li havis fidelajn amikojn ; sed ankaŭ multajn malamikojn. Neniu helpis lin. Neniu konstruisto malfermis por li sian kason. La Aŭtomobila Franca Klubo sendis... sian benon.

Sed Lamblin plene fidis la Aŭtomobilon. Li estis preta, tute sola. krei la Aŭtodromon de Montlhery.

5 hektaroj de betono

En marto 1924, pli ol 2.000 teraĵistoj laboras sur la bieno de S-ta Eŭtropo : Italoj, Hispanoj, Poloj, Ĉehoj. Tranĉilo ĉemane, ili tiom ofte interbatalas, ke oni estas devigata instali, sur la laborejo, taĉmenton de ĝendarmoj. Lamblin ofte vizitas la konstruejon. Samtempe li estras la novan sportan ĵurnalon « Aero Sporto » en kiu verkas Henri Decoin, la estonta filmisto, kaj la bonega teknikisto Raymond Jamin, inĝeniero ĉe Breguet.

La taĉmentoj de teraĵistoj frontas malfacilegan taskon, kaj vastegan. Tamen sep monatojn poste estis finite : la 4-a de oktobro 1924, la aŭtokurejo prestiĝa estas solene inaŭgurita. La Rapideco-Ringo estas larĝa je 18 metroj, longa je 2.500 metroj. La kvin kektaroj da betono estas subportataj de 3.300 fostoj kunligitaj per 7.000 stajoj. La ĝirejoj larĝaj je 21,20 metroj montras impresan deklivon 60-gradan. Konstruita laŭ la teknikoj de 1924, tiu ĉefverko estis tiel perfekta, ke la specialistoj ne ĉesis ĝin admiri.

La sukceso estis tuta : la ĵurnaloj laŭdegis la « aŭtodromon, la plej rapidan en la mondo ». Sen ekstera helpo, Lamblin estis elĉerpinta sian tutan riĉaĵon : tri milionoj da oro-frankoj (1924).

Ve ! la koloso havis argilajn piedojn !

Jam de sia naskiĝo, la aŭtodromo estis minacata. De la unuaj tagoj, la publiko impetegis al Montlhery ; specialaj parizaj aŭtobusoj alkondukis al la aŭtodromo enorman popolamason, kiu admiris en ilia tondra rondo la aŭtokuristojn : Seagrave, Divo, Eldrige sur sia Delage aŭ Sunbeam.

Neantaŭvidita obstaklo montriĝis

La Nacia Strato-20 ne estis tia, kia ĝi estas hodiaŭ ; estis vojo mallarĝa, zigzaga, malbone pavimita, kiu trairis kompaktajn ĉirkaŭurbojn (Longjumeau, Montlhery). Alveni en Montlhery estis jam tre malfacila irado. Foriri el ĝi montriĝis terura problemo : la spektantoj estis tiom multaj, ke ankoraŭ ĉe noktomezo kelkaj malfeliĉuloj atendis en la koto lasita post la grandegaj teraĵaj laboroj.

Plua malbonŝanco : la pluvo ĉiufoje akompanis la konkuradojn en Montlhery. La aĉa vetero, la tenaca koto, la nesufiĉa Nacia Strato-20 bremsis la vizitantojn.

Lamblin esperis : « Certe, Francujo kaj Parizo helpos min ! Certe oni tuj daŭrigos la fervojan linion de Sceaux ĝis Montlhery ! Oni konstruos specialan straton ! »

Ne, nenio estis farata.

Tamen, la britaj ĉampionoj estis instaliĝintaj en Montlhery por sin trejni

La Aŭtomobilo-Klubo Franca proponis al Lamblin : « Apud la Rapideco-Ringo konstruu Stratan Ĉirkaŭiron por la provoj de niaj veturiloj ». Lamblin tute ne hezitas. Li elprenas sian lastan monon. Li konstituas kun inĝenieroj, teknikistoj kaj eksaj aviadistoj Societon : estas « La Aŭtodromo ».

En januaro 1925 oni komencas la Stratan ĉirkaŭiron. 6 monatojn poste ĝi estas finita por la Granda Premio. Longa je 11,25 km, larĝa je 10 m., borderita je gardoreloj kaj 2 m-larĝaj vojflankoj, estis belega strato kun antijoranta tegaĵo kun 15 betonaj ĝirejoj ; ĝia profilo plej multe diversigita, proponis ĉiajn malfacilaĵojn kapablajn elprovi ĉiajn veturilojn.

La Granda Premio okazis en julio meze de enorma popolamaso. Ve ! la kuristo Askari mortas sur sia Alfa-Romeo kaj la spektantoj estis tiom multaj, ke ili bezonis 6-7 horojn por reiri Parizon.

La spektantoj pli kaj pli maldensiĝis kaj de tiam nur la fideluloj venis en Montlhery. Oni vivetis : oni donis la nomon Montlhery al subtertrajna stacio ; oni luigis la aŭtodromon por sportaj filmoj.

Lamblin estis ĉion perdinta : sian riĉaĵon, sian uzinon, sian sport-ĵurnalon.

Tiam, venis Andre Citroën

Unu matenon de 1927, alvenis tio, kion la dungatoj de Montlhery nomis « la kokinaj kaĝoj » aŭ la « sardinaj skatoloj ». Estis la B-14 Citroën. La Templo de la Aŭtomobilo estis iĝinta nur ordinara provkurejo por la novaj aŭtomobiloj. Per kontrakto, renovigebla ĉiun jaron, Citroën rajtis konstante rondirigi 20 veturilojn sur la Rapideco-Ringo kaj 20 veturilojn sur la Strata Ĉirkaŭirejo. Teknikistoj de la Citroën-uzino konstante ĉion superrigardis. De tiam Citroën estis la nura monrimedo de Montlhery. En 1933, Lamblin mortis en mizero. Iom pli poste lia edzino mortigis sin. En 1936, la Societo-Aŭtodromo decidis vendi la bienon. Ĉele al partigo por konstruado de domoj kaj domegoj. Sed en 1939 estas la Ŝtato, kiu aĉetis la tuton por la militista instruado de la Motorizita Kavalerio. La Dua Mondmilito okazis ; pro detruado kaj malbona vetero la aŭtokurejoj difektiĝis.

Tamen en 1946, Sro Legrain-Effel, prezidanto de la Centro pri Teknikaj Studoj, ricevas la administradon de la Aŭtodromo ; estas la Militista Ministrejo, kiu efektivigas ĝian rebonigadon kaj prizorgadon. En 1947, Montlhery pasas sub la kontrolon de U.T.A.C. (Teknika Unuiĝo de Aŭtomobilo kaj Ciklo) kaj estas por la aŭtomobilaj firmoj ideala provbenko, por trejnado aŭ konkurado.

Lamblin estus estinta kontenta : la tri kvaronoj de la internaciaj konkuradoj okazis en Montlhery.

Aŭtomobila Provbenko

Antaŭe la Provoj okazis inter Versailles kaj Rambouillet ; ĉar estas necese provi ĉion, ĉe plej diversaj kondiĉoj : ĉe varmo aŭ malvarmo, ĉe pluvo, nebulo, neĝo aŭ sun ; ĉe nula vento aŭ dum tempesto. Provi la motoron, la valvojn, la pneŭojn, la vitro-viŝilojn, la lampetojn, la karburatoron, la bremso-garnaĵojn, la ventolilajn rimenojn... Veturi, veturi senhalte... ĝis ĉio rompiĝos.

Por la Provisto ne estas facila tasko ; same peniga por la teknikisto, kiu akompanas lin kaj kies rolo estas ĉiusemajne elpreni unu aŭtomobilon el la fabrikado-ĉeno por ĝin provadi. Poste la veturilo reiras al la uzino, kie oni ĝin dispecigas kaj plej detale ekzamenas. La Provistoj ne similas unuj la aliajn. Kelkaj plej delikate testas la veturilon ; aliaj ĝin torturas, se-eble ĝis morto. Eĉ en plena somero necesas veturi kun la fenestroj fermitaj ; eĉ nura ventoluko malfermita alportas ŝanĝon, kiu, post multaj horoj, falsigas la rezulton de tre preciza eksperimento. Sur la vasta loko, kiun Lamblin intencis dediĉi al sportoj, oni kreis unu « sonoran kurejon » por specialaj provoj : betona Kurejo ripigita por plej altgrade vigligi la plej etajn bruojn de la karoserio, kiun oni volas tute bruimuna, sensona.

Kaj jen la « ondolado » simila al la sahara-aj vojoj aŭ al la « rusaj montoj » ; ĝia tegaĵo konsistas el paralelaj ondadoj, « azen-dorsoj » por elprovi la sku-moderigilojn. La pavimita parto estas terura sinsekvo de misformitaj baz-nudigitaj pavimeroj, de « kokin-nestoj ». Por veturi dum horoj kaj horoj sur tiu diabla kurejo, la kondukisto bezonas larĝan ledan zonon por subteni liajn viscerojn. Li veturas aŭ kun la vitro-viŝilo funkcianta, aŭ kun la ellastubo garnita de brul-gas reutiligilo, aŭ okaze de malvarma, nebula vetero por kontroli la prujnadon de la karburatoro.

Tre precizaj mezur-aparatoj kontrolas la konsumadon je 1/2 cl. precize ; laŭlonge de la veturado elektraj kronometroj kontrolas akceladojn kaj malakceladojn.

La sportaj kondukistoj estis perkontrakte ligitaj al la konstruistoj de veturiloj, al la fabrikantoj de pneuoj, de karburiloj, de lubrikaĵoj. Ĉiu rekordo gajnita estis preteksto por granda reklamado.

Tamen necesis, ke la rekordo « sin tenu » unu monaton por esti aŭtentigita. La konkurado estis intensa. Necesis antaŭvidi la estontecon : oni ne devis unuaprove atingi la sensacian rekordon. La granda arto estis gajni nur iom pli ĉiutage, dum la tuta monato, sur la antaŭa rekordo ! En 1927, Fraŭlino Stewart tre bone aranĝis sian aferon : tuj de la foriro, ŝi impetigis kvazaŭ bolido... kaj fine de la kuro, ŝi haltis je 10 cm de la alvena linio ; ŝi saltis teren kaj trankvile atendis, ke la kronometro signu al ŝi ; tiam per nura puŝo antaŭen ŝi transigis la limon al sia Miller ; la rekordo estis gajnita, lasanta atentindan marĝenon por la sekvontaj tagoj. Fraŭlino Stewart estis pitoreska persono ; ŝi povis vivi nur en la odoro de la benzino kaj en la maĝado de la motoroj ; ŝi loĝis sub la kurejo, kie oni estis instalinta, en la altaĵo de la gigantaj ĝirejoj, aŭto-ŝirmejojn surstaritajn de kvazaŭaj ĉambretoj.

Rekordoj

Multaj rekordoj estis starigitaj en Montlhery. Tamen tiu de la 50.000 km montriĝis fatala por kelkaj konkurantoj. En 1926, Breton mortis sur sia Panhard je 232 km-hore. Iom pli poste Eldrige faris fantastan kabriolon ; unu splito el liaj nigraj okulvitroj mankis krevigi al li unu okulon. En 1929, Cesar Marchand plenrapidece superpasas la ĝirejon ; feliĉe por li, li estis elĵetata el sia sidilo. En 1933 Ruggieri mortis sur sia Maserati.

En 1928, John Bruce kaj lia edzino celas la 20.000 kilometran rekordon.

Jam de 5 tagoj kaj 5 noktoj, ili alternas en sia halucina rondo, sub la neĝo, kiu ne ĉesas fali. La 5-an de decembro, ili estis gajnantaj la 4.000 kilometran rekordon ; poste tiun de la 5.000 km ; poste tiun de la 10.000 km. La 14-an decembro tiun de la 15.000 km. La 20.000 kilometra rekordo, tute nove atingota rekordo, estas celata. Tamen la neĝo falas, falas... ; la radoj estis strekantaj en la dika neĝo-tapiŝo, paralelajn striojn, en kiuj la veturilo firme sin tenas ; la vento ĵetas blindigajn neĝokirlojn.

Kaj subite, je la 7-a vespere (John neniam memoris kiamaniere tio okazis) la blanka pejzaĝo renversiĝas... kelkaj surdigaj « barel-turniĝoj »... brutala skuo... kaj silento. John retroviĝas kaptita sub sia veturilo, kun la kapo malsupren. La helpoj tuj alvenas. Sed Bruce estas jam elmergiĝinta el la veturilo kaj restariginta ĝin. Sed la skuo kaj lia dolorigita ŝultro tremigas lin. Tute inerta estas la aŭtomobilo. « Mi eksiĝas, diras John, despli malbone por la 20.000 km ». Sed Sinjorino Bruce estas ĉi tie « Ne, ne, ŝi diras ni daŭrigas la kuradon ! »

Oni helpas Bruce por reloki la aŭtomobilon sur la kurejon (nur tion oni rajtis fari). Ankoraŭ tremanta kaj stultigita de sia timiga kabriolo, kun la dentoj kunpremitaj, Bruce, per sia dolora sultro, centimetron post centimetro, puŝas la pezan veturilon. La malgranda S-ino Bruce, de sia tuta energio, ĉiun minuton kuraĝigas lin ; ŝia kapo kaj ŝiaj ŝultroj malaperas sub karapaco de neĝo. Malantaŭ ŝi sekvas la severa silueto de la teknika komisaro. John Bruce, per siaj nuraj propraj klopodoj, devas atingi la proviantadan standon. Tiu pied-reveno daŭris 5 horojn.

Je tagiĝo, post la riparoj, John daŭrigas la kuradon ; 2 tagojn poste la freniziga rondo estas finita. Kvankam la meznombra rapideco falis ĝis 107, 547 km-hore, Bruce estas gajninta la 20.000 kilometran rekordon.

Simone GUILLOT.

PRI ETNISMO, LINGVO "OC" KAJ ESPERANTO [1]

1. Iom da historio :

En 1539, per la dekreto de Villers-Cotterets, reĝo Francisko Ia ordonis, ke ĉiuj administraciaj kaj juraj aktoj en la tuta reĝlando estu de tiam redaktotaj en franca lingvo.

11. — *Dekadenco de la okcitanaj lingvo kaj kulturo.*

Jam ekde la 13a jarcento, post la venka krucmilito de Simon de Montfort kaj nordfrancaj baronoj kontraŭ la Albigensoj (kataroj), la okcitana, la glora idiomo de la trobadoroj, regresis kiel skriba kulturlingvo.

En la frakasita potenco de mondfamaj brilegaj kulturcentroj kiel Tuluzo k.a., ĝi iom post iom velkis.

Okazis ja kelkaj ekstreboj por ĝin revigligi. Jam en 1323 estis fonditaj en Tuluzo la « Floraj Ludoj », institucio ankoraŭ vivanta. En la 16a jarcento oni povis paroli pri « unua renesanco », en Paŭo ĉe la vigla protestanta kortego de reĝino Jeanne d'Albret ; en Aikso kun Bellaud kaj aliaj provencaj poetoj. Sed tiuj provoj, limigitaj en rondoj de intelektuloj, restis sporadaj kaj efemeraj.

Dume la franca lingvo, jam de la 14a jarcento, altiĝis al la nivelo de literatura lingvo. En la 16a, okcitanaj verkistoj kiel Montaigne kaj La Boëtie verkis en franca lingvo. La Cevenaj hugenotoj legis la Biblion kaj kantis psalmojn en franca traduko.

En la 17a, la franca literaturo atingis sian apogeon, sur kiu ĝi de tiam sin tenadas. En Pezenas kiel en Parizo, Moliero prezentis franclingvajn teatraĵojn.

En la 18a, Montesquieu kaj Florian verkis nur france. En la 19a Alphonse Daudet kaj Paul Arène prikantis sian belan Provencon en franca lingvo. Same, en la 20a, Jean Aicard, Giono, Bosco, Pagnol, Marie Mauron... La Cevenanoj André Chamson, J.-P. Chabrol, J. Carrière, ka, uzis la francan lingvon por glori sian aspran montarlandon.

Tamen la lingvo de « oc », en diversaj lokaj dialektoj, estis daŭre parolata. En la 19a jarcento la felibroj (tiel sin mem nomis la provencaj poetoj) provis redoni al ĝi ĝian iaman karakteron de skriba kulturlingvo. La movado de ili iniciatita, la « Respelido », rapide disvolviĝis tra la intelektaj medioj de tuta Okcitanio, kaj vekis pasian interesiĝon ĉe lingvistoj, filologoj, beletristoj el pluraj landoj trans la limoj de Francio. Sed ĝi ne plene sukcesis, kiel ni vidos poste, pro manko de vera popola bazo.

12. — *Nerezistebla ascendado de la franca lingvo.*

De Francisko Ia al Richelieu kaj al Luizo XIVa, de la Jakobenoj al la korsiko Napoleono, kaj poste en ĉiuj sinsekvaj reĝimoj, inkluzive la IIIan Respublikon kun ties grandparte okcitanaj politikistoj, la ŝtata aŭtoritato plipezigis sian centralizan premadon. La deviga publika instruado de Paul Bert kaj Jules Ferry malpermesis en la lernejoj la uzadon de la regionaj lingvoj, rigardataj kiel dialektaĉoj.

Sekve de la du mondmilitoj okazis inter la diversaj regionoj de la Francia teritorio popola miksado, kiu favoris la hegemonion de la franca lingvo. Kiam mi loĝis en Paŭo de 1941 ĝis 1947, ĉiuj bearnaj infanoj parolis dialekte, tiel inter si kiel hejme kun siaj gepatroj. Kiam mi tien revenis post sepjara forestado, ĉiuj parolis preskaŭ nur france.

Triumfis la unulingveco en la respubliko « unueca kaj nedividebla ». Ĉu definitive ?

13. — *Motivoj de la centraliza strebado kaj de la etnakultura reagado.*

Tiu batalado de la ŝtata potenco por trudi ununuran lingvon estas plene celkonscia. La registoj scias, ke la unueco de lingvo estas unu el la ĉefaj kondiĉoj por firmigi la unuecon de homogena nacio. Tion komprenis ankaŭ la felibroj.

Ilia himno, la « Coupo Santo », diras :
De malnova popolo fiera kaj libera
Eble ni estas la finiĝo,
Kaj se falos la felibroj
Falos nia nacio.
(ili nomis « nacio » la okcitanan etnon).

Kaj Mistral skribis : Kiu tenas sian lingvon tenas la ŝlosilon, kiu el la katenoj nin liberigas.

Por kiu libereco ? Por la rajto esti diferenca (kio ne signifas malamika : Mistral sin proklamis franca patrioto). Por la libereco konservi kaj kulturi tiun diferencon, kaj resti « popolo fiera kaj libera ».

2. La kondiĉoj por sukceso de etnakultura revivigo :

Konsciaj pri la graveco de la lingva faktoro, la felibroj aplikis sian penadon al la tasko ĝin restarigi. Por plena sukceso necesis tri kondiĉoj :

a) redoni ĝian karakteron de literatura lingvo al la okcitana idiomo, kiu falis en dialektaĉojn, per ortografia reformo kaj purigado de la vortaro (tamen konservante la dialektan diversecon). Tio estis tasko de kleruloj.

b) redoni al la tiel renovigita idiomo ĝian vivkapablon kiel kulturlingvo, per literatura kreado. Tio estis tasko de estetikistoj, de artaj verkistoj.

c) rehavigi al ĝi la statuton de oficiala lingvo, per truda premo al la registaro. Tio necesigus amasmovadon.

21. — *Verko de la felibroj.*

La du unuaj kondiĉoj estis brile plenumitaj de la felibroj, inter ili aparte de la sep « Primadié » (unuaj incitiatintoj), kaj inter tiuj ĉi elstare de Frederi Mistral. Li starigis la monumentan « Trésor doŭ Felibrige », kaj lia lingva laboro, gramatika kaj vortaro estis ne malpli grava ol la belaj poemoj, pro kiuj li ricevis la Nobel-premion pri literaturo (1909).

---

(1) Oc (pr. Ok), signifas : Jes.

Realtigante la provencan idiomon al la rango de eminenta kulturlingvo, li ne hezitis enkonduki en ĝin forman revolucion, elpensante grafion multe pli simplan ol tiu de la trobadoroj, preskaŭ fonetikan kaj influitan de la franca (ekzemple « ou » anstataŭ « o » por la sono « u »).

Tiu reformo kaŭzis akrajn kritikojn kaj riproĉojn de la purtradicianoj. Tamen mi opinias, ke ne senmotive li, klera erudicia pri la antikva okcitana literaturo, decidis fari tiun paŝon.

Mistral, burĝe instruita kaj edukita kiel urbanido, volis esti kaj resti proksima al la kampa popolo. En sia dediĉo de Mirèio al Lamartino, li sin nomis kampulo (un paysan), kaj en la unua kanto li skribis :

... Ĉar nur por vi mi kantas, ho paŝtistoj kaj farmuloj (pastre e gèn di mas).

Nu, la provencanoj el la simpla popolo ja parolis provence, sed ili estis instruitaj pri legado kaj skribado en la franclingvaj lernejoj. Al ili aspektis familiare la mistraloteksto :

Naŭtre en plen jour
Voulèn parla toujour
La lengo doŭ Miéjour... (La Respelido, 1904)
(Ni en plena taglumo
Volas ĉiam paroli
La lingvon de Sudlando...)

Transskribite en la renovigita grafio iniciatita de Loïs Alibert kaj de la Instituto por okcitanaj studoj, tiu sama teksto ŝajnus al ili komplika kaj iel barbara, ĉar ili emus prononci france :

Naŭtrei en plen jorn
Volem parlar totjorn
La linga doŭ Miegjorn...

22. — *La kaŭzoj de duona fiasko.*

Nu, malgraŭ tiu peno por meti la lingvon je ilia nivelo, malgraŭ la temoj elektitaj el ilia ĉiutaga vivo, la paŝtistoj kaj farmuloj ne legis la verkojn de Mistral kaj de liaj kompanoj. Ili ja nenion legis, kaj mankis la modernaj divastigaj rimedoj. La felibroj venis tro frue, en ne matura tempo. (Tamen, eble en la apenaŭ ĝusta tempo por savi la lingvon de definitiva morto).

La tria kondiĉo ne estis efektivigita. Mistral, seniluziigita, skribis en « La Grafino » tiujn amarajn bedaŭrovortojn :

Ha ! se ili povus min aŭdi !
Ha ! se ili volus min sekvi ! ...

Tamen li ne perdis la esperon. En poemo de 1907, publikigita en 1912 en lia lasta poemkolekto, lis Oulivado (la oliv-rikolto), li skribis :

Se ne hodiaŭ, estos morgaŭ ...

Do, antaŭ lia morto (1914) kaj longe poste, la tria kondiĉo ĉi-supre difinita por la revivigo de Okcitanio, nome la disvastiĝo de la etnaj lingvo, kulturo kaj konscio, ne estis realigita. Tiurilate, la revo de la felibroj ne efektiviĝis, kaj ilia strebado fiaskis. La kultura movado ja plu daŭras, la lingvo kaj la literaturo estas prizorgataj kaj kulturataj tra tuta Okcitanio en la lokaj skoloj de « felibre manteneire » (konservistoj). Sed tiu movado restas inter la limoj de klerulaj rondoj.

3. La nuna stato de la demando :

31. — *Nova okcitana renaskiĝo.*

De antaŭ kelkaj jaroj reaperis movado por revivigo de la okcitana lingvo. Tiu nova « respelido » ŝajnas ne tiel limigita en intelektaj medioj, pli ankrita en la popolo, kies aspirojn ĝi spegulas. Junaj eldonistoj eldonas aŭ reeldonas okcitanajn librojn ; sed precipe la profunda popola animo esprimiĝas per la voĉo de junaj kantistoj, disvastigata per diskoj, kiuj atingas pli vastan publikon.

Samtempe kiel la vaskoj, la bretonoj, la alzacanoj, la korsikoj, la katalunoj, la antilanoj, multaj okcitanoj reagas kontraŭ la regadon de la parizaj teknokratoj kaj de iliaj lokaj reprezentantoj, la prefektejaj burokratoj.

Al la krio de la montaranoj kontraŭ la armea potenco : « Gardaren la Larzac » (ni konservos Larzakon) respondas tra tuta sudlando tiu de pli kaj pli multaj junaj terkulturistoj, kiuj rifuzas dizerti la kampojn de siaj gepatroj : « Volen viéure al païs » (ni volas vivi sur la lando).

32. — *Etnismo, naciismo, internaciismo, sennaciismo.*

Post la progresa procezo, kiu starigis inter la provincoj rivalecojn kaj konfliktojn, profite al la nacia unuecigo, ĉu tiu nova reago estas regresa, reakcia ? Ĉu hazarde nun vekiĝas en ĉiuj regionoj samtempe la nov-etnisma movado ?

La multjarcenta celkonscia strebado de la ŝtatpotenco por firmigi la hegemonion de la franca lingvo povus resumiĝi per slogano : « Unu nacio, unu lingvo ». La posta ŝtupo povus difiniĝi : « Unu Eŭropo, unu lingvo », kaj la fina : « Unu homaro, unu lingvo ». Tio estas la celo, malproksima, de ni sennaciistoj. Ĉu en ĝia nomo ni kondamnu la etnisman movadon kaj la revivigon de la mortiĝantaj etnaj idiomoj ?

Se ni rigardas la naciismon kiel plej grandan malbonon, kaj la naciojn, jam nun, kiel anakronismajn, ni bonvenigu ĉion, kiu kontribuas al malplifortigo de ilia suverena potenco.

Sur la kampo de ekonomiaj kaj sociaj konkretaĵoj, ĉiu urbo, ĉiu vilaĝo havas proprajn problemojn, pri kiuj ĝi decidu mem sen interveno de la ĉefurbaj instancoj. Ĉiu regiono devus aŭtonome pritrakti siajn komunajn aferojn. Por tiaj temoj la nacia kadro estas tro vasta.

Por multaj aliaj ĝi estas jam tro strikta. Kiel demonstras la mondcivitanoj, la tutmonda homaro estas solidare alfrontata al demandoj, kiuj povas esti nur mondskale solvataj. Anstataŭ « unio » de nacioj, t.e. konfederacio de suverenaj regnoj forte armitaj por konservi danĝeran ekvilibron, devus regi federacio de interdependaj regionoj, mem konsistantaj el federacioj de komunumoj.

En tia skemo ĉiu regiono plej racie ekspluatas siajn naturajn rimedojn, kaj la homara solidarsento kondukas la plej evoluintajn popolojn al helpado por altigi la aliajn ĝis sia vivnivelo. Cetere, favore al ĉies intereso, ĉar daŭra troa malegaleco kreas danĝeron pri konfliktoj kaj eksplodoj.

33. — *Kultura aspekto de etnismo.*

Jen do pri la materiaj vivkondiĉoj. Koncerne la spiritan vivon, la etnoj (kies teritorio ne ĉiam koincidas kun tiu de natura regiono) diferencas inter si laŭ kulturaj formoj : tradiciaj penskutimoj, frazkonstruoj, esprimmanieroj.

Eĉ la folkloro ne estas seninteresa, ĉar la etnaj kostumoj estas bone adaptitaj al la klimato kaj laborkondiĉoj, kaj la tradiciaj rakontoj, kantoj, muzikoj, dancoj, enkondukas en la esprimadon de pensoj kaj sentoj, funde komunaj al la tuta homaro, riĉan variecon en la formoj.

Same, estus malsaĝe hereze konstrui normandiajn vilaojn en Provenco, aŭ provencajn « mas' » ojn (farmodomoj) en Flandrio aŭ en Aŭvernjo. La tutmonda ĝeneraligo de samstilaj beton-muroj kaj -turoj estas aflikta, same kiel la « bluĝina » uniformo efikas ridinde.

34. — *Malfacila batalado.*

La nova etnismo kontraŭbatalas la procezon, kiu pli kaj pli rapide unuformigas la tutan homaron laŭ la modelo de modernaj usonaj urbanaroj, pere de la « mass-media » kaj de la kreskanta hegemonio de la angla -usona lingvo. (Cetere, ne sen malavantaĝo por la angla lingvo mem, kies purecon ĝi endanĝerigas. Pri tiu danĝero estas tre konsciaj kelkaj anglalingvaj kleruloj).

Jen estas kultura imperiismo, kontraŭ kiu necesas ekstari, same kiel kontraŭ la industria kaj komerca imperiismo.

Kelkaj esperantistoj akuzas nin sennaciistojn pri « lingva imperiismo », pro la slogano : « Unu homaro, unu lingvo ». Ili eraras pri la pafcelo.

Ni male pretendas, ke esperanto estas la plej taŭga batalilo kaj ŝirmilo kontraŭ la vera lingva imperiismo, tiu de la usona lingvo, kiu nuntempe marŝas rapidpaŝe al triumfo por plej granda profito de la multnaciaj entreprenegoj. Nun la vera minaco venas de tiu « grandnacia » imperiismo (Vd. en S-ulo de Februaro 1980, Ĉies opinioj, la artikolon de Jacqueline Lepeix, « Pri la usona imperiismo »). Kompreneble, ni havas nenion — krom simpation — kontraŭ la usona popolo kaj ĝia originala kulturo, kiu estas unu el la plej vivantaj en la mondo ; temas pri tute alia afero.

35. — *Esperanto kiel helpa kulturlingvo.*

Ĉu Esperanto, por kiu ni ambicias la rolon de organo de la kreota tutmonda kulturo, prezentas danĝeron por la naciaj lingvoj ?

Ni konstatas, ke tiuj lingvoj posedas riĉan literaturan trezoron, tutmonde konatan pere de tradukoj. Tamen, kelkaj malgrandaj nacioj ne konsistigas sufiĉe multopan legantaron por financigi eldonojn en ilia lingvo. Al tiu demando esperanto alportas praktikan solvon, ebligante unu nuran tradukon por pluraj kaj multaj diverslandaj legantaroj.

Oni povas kontraŭdiri, ke la esperantista publiko en la tuta mondo estas ankoraŭ pli malmultopa ol tiu de iu ajn malgranda nacio. Unue, tio ne estas tute certa. Due, estas fakto, ke -eble dank'al malavareco de la esperantistaj eldonistoj — jam nun tiu publiko disponas pri kelkaj verkoj kaj antologioj ne haveblaj en aliaj lingvoj.

Ne estas danĝero, ke la naciaj kulturoj perdiĝus per malapero de la nunaj naciaj lingvoj. Sed, eĉ se tiuj lingvoj mortus, kiel mortis la antikvaj greka kaj latina, iliaj majstroverkoj estus savitaj pere de esperantaj tradukoj.

Alie estas pri la etnaj idiomoj, la regionaj dialektoj.. Ĉu ĝi prosperos aŭ ne, la nuna movado por ilia revivigo estas utila, ĉar ĝi permesas, eble « in extremis », savi de forgeso ilian altvaloran kulturtrezoron.

Por ili Esperanto povos ludi la rolon de neŭtrala interligilo. Kiel vehikla lingvo, ĝi ebligos reciprokan riĉigadon per interŝanĝoj sur bazo de egaleco.

Tiel « la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian ». Tiel la tutmonda kulturo, dezirata kaj vokata de la sennaciistoj, efektiviĝos : ne per senkolora unuformeco laŭ unu medelo, ne en monotona grizaĉo, sed ne bunta diverseco. La originalaj formoj, ame konservataj kaj kulturataj, ne restos apartigitaj en la limoj de siaj respektivaj teritorioj, sed, en harmonia kunekzistado, ili sin interpenetros kaj reciproke fekundigos.

Resume :

a) la etnaj idiomoj havas profundajn radikojn en grundo. Ni defendu ilin.

b) la naciaj lingvoj, per historia procezo, akiris vastan kulturan bazon. Ankaŭ ilin ni defendu (jes !).

c) Esperanto estas ideala pontolingvo inter ĉiuj idiomoj. Ni disvastigu ĝin.

d) Esperanto estas la natura esprimilo de tutmonda eksternacia penso kaj sento. Ni eltrovu kaj elvolvu ĉiujn ĝiajn latentajn eblojn.

4. Lingvo « oc » kaj Esperanto :

41. — *Tradukoj.*

En Okcitanio en la lastaj jaroj estas publikigitaj diversaj antologioj el poemoj de mezepokaj trobadoroj, kaj pluraj verkoj de la ĉefaj felibroj estis reeldonitaj. Jen estas nova kampo plugenda de niaj tradukistoj.

La verkoj de Mistral estas de li mem francigitaj, sed, krom parte Mirèio, ili ne estas monds-kale disvastigitaj per alilingvaj tradukoj. Almenaŭ Mirèio kaj Calendal, alia majstroverko kvankam malpli fama, meritus esti diskonigitaj per la lingvo universala. Ni signu tiun taskon al okcitanaj esperantistoj. Pri Mistralverkoj, speciale al provencaj samideanoj, bone scipovantaj sian lingvon kaj kapablaj korekte kaj lerte esperantigi ĝin.

Mi mem provis doni modestan ekzemplon atakante la plej facilan, la « Pouemo doŭ Rose » (Poemo de Rodano). Ĝi estas la plej facila, ĉar la sola verkita de Mistral en senrimaj versoj de egala longo : tiel oni povas plej fidele sekvi la originalan kaj konservi ties ritmon. Mia traduko, en formo de manuskripto, troviĝas nun en bonaj manoj de du plej kompetentaj kamaradoj : prof. Duc-Goninaz kaj Jullien en Aikso-la-Provenca. Ilia kontrolado garantios pri la fideleco al la originalo kaj pri la lingva korekteco.

Multe pli malfacila estus la esperantigo de la rimitaj poemoj Mirèio kaj Calendal. Por ĝin kontentige efektivigi necesus la talento de iu provenca Kalocsay aŭ Waringhien. Eble tia jam ekzistas, aŭ iam ekzistos.

Atendante, ĉu neniun pli modestan tentus la provo esperantigi la prozajn « Memori e Raconte » (Rememoroj kaj Rakontoj) ?

42. — *Felibroj kaj Esperantistoj.*

Ĉiam estis simpatio inter ambaŭ medioj kaj movadoj, kaj pluraj felibroj estis ankaŭ aktivaj esperantistoj. Kuraĝiga estas la ekzemplo de tiuj glorindaj antaŭ-uloj. Inter ili ni menciu unuavice Valère Bernard (1860 - 1936), marsejlano, provenca kaj esperantista poeto (li verkis delikatajn poemojn en ambaŭ lingvoj). Valère Bernard, tre modesta, ne ĝuis vastan famon. Tamen, li estis « felibre majourau » (alta grado en la hierarkio), kaj eĉ estis iam elektita « Capoulié dou Felibrige » (la plej alta grado, tenata sinsekve de unuopuloj depost la unua, Mistral mem). En la esperantista movado Valère Bernard elvolvis tre efikan aktivecon meze de la marsejla grupo, kies ĉefa animanto li estis.

Aliaj esperantistaj felibroj estis Paul Champion, avinjonano, tradukinto de la tri unuaj kantoj de Mirèio, Contancin, Aiksano, kapitano Martin el Nico, Louis Laget, animanto de la arleza grupo, fondinto de la bela, ho ve ! efemera revuo « Tra Provenclando », kaj pluraj aliaj.

43. — *Mistral kaj Esperanto.*

Iam mi aŭdis jenan anekdoton :

En 1909 la tri unuaj kantoj de Mireio estis esperantigitaj de P. Champion kaj Dro Noël. La du tradukintoj iris al Majano por prezenti sian tekston al la aŭtoro. Unu el ili laŭtlegis ĝin. Post kelkaj strofoj Mistral interrompis lin : « Vidu, sinjoroj, mia hundo ĉiam bojas, kiam ĝi aŭdas paroli france. Nun vi parolas esperante, ĝi atente aŭskultas, kaj ne bojas ».

Kiu iam aŭdis el la buŝo de aiksano aŭ de arlezanino tiun provencan idiomon, unu el la plej belsonaj en la mondo, tiu komprenas, kiel granda komplimento pri la belsoneco de esperanto kuŝas en tiuj vortoj de la plej alta kompetentulo. Tio kuraĝigu min, provencajn esperantistojn : ni sentime asertu, ke esperanto plej taŭgas por traduki sen troa malfideleco la juvelojn de nialanda literaturo.

Nun ni lasu la parolvicon al mia malnova amiko Honoré Bourdelon.

« Iam en aŭtuno de 1912, mi troviĝis sola kun la majstro (Frederi Mistral) en la publika poŝtveturilo de Graveson-stacio al Majano. Ni ambaŭ venis de Arlezo ».

« La konversacio ekis, en miksitaj franca kaj provenca lingvoj, pri tiuj ekstraktoj el liaj « Memori e Raconte ,» kiuj troviĝas en legolibroj por unuagradaj lernejoj (en la Franca teksto, kompreneble).

« Poste mi demandis lin, kion li opinias pri la traduko de Mirèio en esperanto, ĵus publikigita de Paul Champion, esperantisto kaj felibro en Avinjono. Mistral momenton pripensis, poste li simple respondis : « Se tiu lingvo havas la povon diskonigi nian belan Provencon tra la mondo, tio faras al mi multe da plezuro ».

« Plie, li komprenigis al mi, ke li tre aprecus tradukon en esperanto de « Memori e Raconte ». Eble iam tiu deziro estos plenumita... »

Amikoj, provencaj samideanoj, ek al laboro !

VALO.

La 4a ĉapitro, paragrafoj 42 kaj 43, estas grandparte ĉerpitaj el du tre interesaj franclingvaj artikoloj aperintaj en « l'Essor de l'Esperanto » ; unu de André Albault : Valère Bernard, poète et esperantiste occitan (4e trimestre 1955), unu de Honoré Bourdelon : Esperanto et Félibrige (3e trimestre 1956).

Mi ŝuldas al la senlaca komplezemo de amiko Jean Amouroux en Perpinjano la afablan komunikon de tiuj du numeroj, nun certe malfacile troveblaj.

Kelkaj historiaj precizaĵoj en la unua parto estas ĉerpitaj el okcitanlingva artikolo de Roland Petout en « Connaissance du pays d'oc » de marto-aprilo 1978 sub la rubrika titolo « Agach Occitan ».

VALO.

Honoré BOURDELON

En Greziljono, multaj staĝintoj havis la plezuron koni Honoré Bourdelon, kiu gvidis plurajn kursojn de Esperanto kaj de bindarto. Ĉiuj memoras lian afablecon. Nu, ni havas la ĉagrenon sciiĝi lian morton, en Arlezo, la 21an de septembro, tiam 88 jaraĝa. Lia agado por esperanto meritas ke oni konu ĝin.

Ek de sia esperantiĝo, en 1909, li estis unu el la fondintoj de la grupo en Arlezo kaj ĝia sekretario ĝis 1920. Tuj li aliĝis al U E A kaj estis delegito en Marsejlo dum 18 jaroj. Li kreis grupon en Brignoles en 1928 kaj restarigis tiun de Marsejlo en 1932.

Inter 1932 kaj 1940, senlace li propagandis. Li faris po 15 minutoj ĉiusemajne ĉe radio-stacio « Marseille-Provence » paroladojn pri Esperanto : propagando, novaĵoj, kursoj, turismaj sciigoj. En la sama epoko li gvidis Esperanto-fakon (kiel oficiala komisaro) kaj standon en la « Marsejla Internacia Foiro ». Li estis Prezidanto de la L K K de la naciaj kongesoj de U F E en 1956 kaj 1957. Li organizis la Universalan Kongreson de U E A antaŭviditan por 1940. Pro la milito, tiu kongreso ne okazis kaj Bourdelon kaŝis la flagon de la kongresoj en kelo de propra domo en Arlezo.


Deksep jarojn poste, denove, li estis Prezidanto de la L K K de la 42a Universala Kongreso de U E A en Marsejlo (1957).

De 1909 ĝis nur kelkaj jaroj antaŭ sia morto, seninterrompe li gvidis publikajn kursojn, prezentis publikajn prelegojn, verkis artikolojn en diversaj gazetoj kaj revuoj esperantistaj kaj neesperantistaj.

Dum pli ol duonjarcento, li estis la plej agema, la plej konata propagandisto de nia lingvo en Provenco.

POR VIA DISTRO

Krucvortoj (proponitaj de S-ro G. Parisot)



(R) = nur radiko

Horizontale

1 — Grava kunveno.
2 — Kolekto — El la koro.
3 — Distinginda.
4 — Pasiva sufikso — Kiamaniere ?
5 — Numeralo — Interne — Altvalora metalo.
6 — Burleskaĵo.
7 — Kopii (R) — Li kaj ŝi.
8 — Ino de sovaĝa kuniklo.
9 — El la metalo de la H/5-3 — Temanta pri amo aŭ amoro (R).
10 — Flankenŝoviĝo de aŭto — Nedifinita pronomo.

Vertikale

1 — Florburĝonoj uzataj en kuirarto.
2 — Kovri per valora metalo — Senfenestra ĉambreto.
3 — Signi per vorto — Rebonigi (R).
4 — Signo, pruvo.
5 — La televido estas malgranda... — Prefikso.
6 — Ŝtonego (R) — Frukto.
7 — Malalta arbo (R) — Batrako.
8 — Nulo — Kompanio.
9 — Haŭttavolo — Sufikso.
10 — Ebena fermita kurbo — Incitete piketi.

Historietoj

Policano alparolas ŝoforaĉon, evidente ebrian, kiu kontraŭsence veturas sur unusenca strato.

— He ! amiko ! Kien vi iras tiamaniere ?

— Mi ne scias, kio okazas, Sro Policano, respondas la alia per pasteca voĉo. Sendube mi malfruas ! Vidu ĉiujn tiujn ĉi. Ili ĉiuj jam revenas !

Junaj geedzoj ricevas amikojn en sia nova apartamento : ĝi estas unu el tiuj apartamentoj, kies kosto estis plej minimume kalkulita.

Subite, unu el la vizitantoj eksaltas. Li aŭdas karakterizajn kraketojn : « Ne estas kredeble ! Vi havas musojn en tiu nova domego ? !

— Ne respondas la dommastrino ; estas nur la najbaroj, kiuj manĝas rostitan panon !

Knabeto ofte petis, ke oni donu al li hundon.

Okaze de lia naskiĝtago Paĉjo proponas :

« — Niĉjo, se mi donus al vi 100 frankojn, ĉu ci aĉetus hundon 100-frankan ? ĉu ci aĉetus 2 hundojn po 50 frankoj ? aŭ ĉu ci aĉetus unu hundon 50 frankan kaj metus la ceteron sur cian ŝparkaso-libreton ?

— Nu, Paĉjo, se vere ci lasas min elekti, mi preferus aĉeti cent hundojn po unu franko !

Al plibonigo

Sur la « bilardo » la operacioto estas tre pala. Li timas suferon, morton kaj tremas. La kirurgo klopodas lin kvietigi : « Nu, mia amiko, ne timu ; vi povas fidi min : tiu operacio estas infaneco simpla ». Sed, ĉar la patiento daŭre maltrankviliĝas, la operacionto provas lin distri :

« — Kia vi opinias mian barbon ? », li demandas.

Iom surprizita la malsanulo tamen afable respondas :

« — Belega ! Profesoro, belega ! ĝi tute ŝajnas tiun de Karolus la Granda aŭ tiun de Moseo.

— Do, atente rigardu ĝin ; Kiam vi vekiĝos, vi tuj revidos ĝin ! ».

La malsanulo plene dormas...

Efektive, kiam li rekonsciiĝas, kun plezuro li revidas la belan barbon.

« — Ho ! multan dankon, Profesoro, mi tute ne suferis ! ».

Kaj la barbo respondas :

« — Kial vi nomas min Profesoro, mia infano, mi estas Sankto Petro ».

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (280 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2 400 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1980, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La « saison » 1981 est terminée, la 29e ! Si le premier stage n'a pas été favorisé par le temps, il n'en a pas moins été animé, avec un programme relativement dense et en tous points intéressant. Les conférences de H. Röllinger, R. Schulz, F. Roose, F. Boyet, A. Childs-Mee, B. Cheverry, A. Spenser, P. Métivier ont été suivies avec beaucoup d'attention, ainsi que les cours guidés par J. Vincent et F. Boyet. A la deuxième période, succès également pour les cours de A. Childs-Mee, R. Lloancy, A. Mollison,, A. Ribot. Les activités de la troisième période, menées par M. et Mme Grela, ont beaucoup plu, et les cours de Juanita Turbillon et de MM. Boyet et Parisot ont été bien suivis. Pendant tout l'été, les « travaux manuels » été conduits par Mmes Boyet, Cheverry, Delforge et Vilhelm et M. Benaïm. Le nombre de stagiaires a été relativement équilibré, avec une pointe à la deuxième période et une diminution notable dans les derniers jours de la troisième. La participation étrangère a été bonne grâce aux animateurs et aussi à l'activité des participants. Quant aux résultats financiers, un aperçu sera donné comme d'habitude à la réunion du Conseil d'administration d'octobre, lorsque la plupart des factures auront été payées.

La rénovation du couloir du deuxième étage devrait commencer le 15 octobre. Les artisans concernés s'y sont engagés. Mais... Une chambre à un lit sera aménagée sur la surface de la chambre 29, comme il a été fait au premier étage pour la chambre 2. Ces travaux et la réfection de la chambre 1 constituent le maximum de ce que nous pourrons faire cette année sur les fonds de la Maison.

Il va falloir aussi, dans l'année qui vient, mettre au point une répartition des responsabilités et des tâches qui entraînera sans doute la participation effective de tous les membres du Conseil d'administration et des conseillers techniques, le nombre de ces derniers pouvant varier selon les besoins.

Enfin, pour sa prochaine réunion, le Conseil d'administration fixera le calendrier des stages de 1981. Le programme devrait être à la disposition des intéressés au début du mois de novembre. Demandez-le et inscrivez-vous très vite. Cette année encore, dès le mois de mai, nous avons été obligés de proposer des places en chambre commune à ceux qui désiraient une chambre particulière, ou même de refuser des inscriptions. Il est vrai que d'un autre côté, avec une belle désinvolture, certains inscrits ferme ne sont pas venus et nous attendons encore de leurs nouvelles. Les logements réservés sont restés vides quelques jours. Cela nous amènera peut-être à demander des arrhes non remboursables lors de l'inscription. C'est dommage. Il ne faudrait pas que l'aspect commercial l'emporte, et que nous recevions plus de clients que d'amis.

P. BABIN.

INTER NI

La 29-a grezijona somero finiĝis. Kvankam la vetero ne estis bela la unua periodo estis tre interesa kun prelegoj de S-inoj B. Cheverry, A. Childs-Mee, A. Spencer kaj de S-roj H. Röllinger, R. Shulz, F. Roose, F. Boyet, P. Métivier. Ankaŭ okazis kursoj gvidataj de S-ino J. Vincent kaj S-ro F. Boyet. Dum la dua periodo S-ino Childs-Mee, S-roy Lloancy, Mollison, Ribot grandsukcese gvidis diversnivelajn kursojn. La artaj aktivaĵoj de la tria periodo kun Ges-roj Grela, la kursoj de F-ino Turbillon kaj S-roj Parisot kaj Boyet estis sukcesplenaj. Dum la tuta somero estis eble lerni diversajn manfaradojn. La nombro da ĉeestantoj estis kontentiga, pli granda dum la dua periodo sed malpli fine de la tria. Granda nombro da alilandanoj ĉeestis. Ili estis eĉ pli multaj ol la francoj dum la unua periodo.

La 15-an de oktobro espereble komenciĝos la riparado de la duaetaĝa koridoro. Granda laboro kaj grandaj elspezoj ! Dum la venonta jaro ni devos starigi novan sistemon de dispartigo de la taskoj inter la diversaj konsilianoj.

Dum la venonta kunveno de la konsilio la kalendaro de la aktivaĵoj por 1981 estos finpreparita. Vi povos peti la programon meze de novembro kaj rapide aliĝi. Ĉijare loĝis en komuna ĉambro personoj, kiuj, komence de majo, petis loĝadon en unulitaj ĉambroj. Ni eĉ devis rifuzi kelkajn aliĝojn. Aliklanke « firmaj » aliĝintoj ne venis kaj eĉ ĝis nun ne skribis. La rezulto estas, ke ĉambroj aŭ litoj estis neokupitaj dum kelkaj tagoj. Ni bedaŭras tian agon ĉar ni preferas akcepti amikojn ol klientojn.

PARTICULIEREMENT ADAPTE
A VOS COURS DE PRATIQUE

UTILISE DANS PLUS DE DIX PAYS

"POR LA PRAKTIKANTOJ"

PLUAJ PAŜOJ AL PLENA POSEDO

prezo : 22 francs

Rabato por mendo de pli ol 5 ekzempleroj

Mendoj al nia LIBRO-SERVO

LIBRO -- SERVO

Extraits de notre catalogue

Commandes à :

S-ro G. CIRET,
« La Timeraie », Vieil-Baugé - 49150 Baugé

Prix franco au-dessus de 60 F.

⋆⋆⋆

DICTIONNAIRES et LEXIQUES

Dictionnaire Français - Esperanto (Léger, Albault)	26,00
Dictionnaire Esperanto - Français, Français - Esperanto	45,00
Grand Dictionnaire Esperanto - Français (Waringhien)	60,00
Konversacia Vortaro (Cseh)	5,00
Lexique fondamental (Léger)	10,00
Oportuna Vortaro de Ordinara Esperanto (V. Setälä)	18,00
Praktika bilvortaro	30,00
Plena vortaro kun suplemento	45.00
Plena Ilustrita Vortaro	195,00
Vocabulaire Esperanto (Duc Goninaz)	15,00

⋆⋆⋆

LIVRES D'ETUDE

Abrégé pratique de grammaire (I.C.E.M.)	8,00
Cours sur disques « Tra la Mondo » (Ribot)	100,00
Gramatika Gvidlibro (G.E.E.)	8,00
Gvidlibro por la ekzamenoj (F.E.I.)	4,00
Gvidlibro por supera ekzameno (A. Pechan)	35,00
Junulkurso (S.A.T.)	20,00
complément	5,00
5 disques	30,00
Kiel diri ? (Lentaigne)	15,00
Ludoviko en Nederlando (Delaire)	60,00
Manuel d'initiation (Thaillet)	5,00
Manuel d'étude (Couteaux)	6,00
Manuel de perfectionnement (Couteaux)	6,00
Ni parolu en Esperanto (avec corrigés) (Ribot)	8,00
Nos premiers pas en Esperanto (avec disque) (Ribot)	4,00
Nouveau Cours Rationnel (S.A.T.)	32,00
Parler l'Esperanto (Volpelière)	20,00
Paŝoj al plena posedo (Auld)	28,00
Por la praktikantoj (Babin)	22,00
Précis grammatical (Ribot)	3,00
Premier manuel	3,00
Privilegia vojo (Setälä)	20,00
Sub la verda standardo (Korte), laborilo 1	7,00
Sub la verda standardo (Korte), laborilo 2	8,00
Sub la verda standardo (Korte), gvidlibro	9,00
Règlements et programmes des examens de F.E.I.	1,50
Textes de préparation à l'Atesto pri Kapableco	10,00
corrigés	5,00

Pour animer vos réunions de groupe
à partir de textes vivants,
et magnifiquement traduits,

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de MAUPASSANT

traduit par Roland DUPUIS

★

210 pages, relié pleine toile
Illustrations originales
de Robert A. PINCHON

★

PRIX : 36 francs

— **Réduction à partir de 3 exemplaires** —

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	25,00
Pendentifs	:	20,00
Porte-clés	:	20,00
Coupe-papier	:	35,00
Thermomètres voitures	:	35,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	4,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 50 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **20,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE

CATALOGUE

...aujourd'hui

Kredu Min Sinjorino

de **Cezaro ROSSETTI**